Ek al novaj sukcesoj, kaj gratulon al ĉiuj kunlaborantoj de E-D-E !

Edmond LUDWIG

Esperantisto en la eŭropa parlamento !



Małgorzata

HANDZLIK

Mamy wspólne marzenia...

Pro la komplikeco de la pola elekta sistemo, nur kelkajn tagojn post la elektoj iĝis certe, ke la pola entreprenisto, ĵurnalisto kaj esperantisto **Małgorzata Handzlik** iĝos ano de la eŭropa parlamento. Ŝi parolas Esperanton de dudek jaroj, kaj Esperanton parolas ankaŭ ŝia tuta familio. Ŝia edzo estas la konata "*bardo sen barbo*", Georgo Handzlik.

Małgorzata Handzlik estas en esperantistaj rondoj pli konata per la esperantigita formo de sia nomo, *Margareta*. Ŝi neniam aktivis en iu politika partio, sed nun kandidatis en la eŭropaj elektoj en la listo de la partio Civitana platformo, kaj sukcesis post nur ses-semajna kampanjo kolekti la necesan kvanton de voĉoj. Entute pli ol 30. 000 homoj voĉdonis por ŝi. La kampanjo estis intensa, kun foje eĉ ses renkontiĝoj en diversaj urboj de la pola regiono Silesio dum la sama tago.

Laŭ ŝia retpaĝo, ŝi decidis kandidati, ĉar ŝi estas forte ligita al sia hejma regiono, kaj la decidoj de la eŭropa parlamento influos la vivon tie, la agadon de la entreprenoj kaj la ĝeneralan evoluon.

En la eŭropa parlamento Małgorzata Handzlik volas labori por sia hejma regiono, sed ŝi ankaŭ esperas aktivi en komisiono, kiu zorgas pri lingvaj aferoj kaj tie **engagiĝi por Esperanto**. Ankaŭ en sia kampanja retpaĝo ŝi **plurloke mencias Esperanton**, kaj la retpaĝo enhavas esperantlingvan membriografieton.

Gravan rolon en la elekto de Małgorzata Handzlik havis la du lokaj radioj, en kiuj ŝi aktive kunlaboras. La radiostacioj Radio Bielsko kaj Radio MEGA ne nur sendas muzikon, sed ankaŭ engaĝiĝas en la sociajn agadojn de la loka loĝantaro kaj apogas bonfarajn asociojn.

De 15 jaroj Małgorzata Handzlik kune kun sia edzo Gergeo (Jerzy) Handzlik gvidas plurajn entreprenojn, el kiuj inter esperantistoj plej konata estas **la eldonejo KLEKS**, kiu eldonas librojn kaj sondiskojn en Esperanto kaj la pola lingvo. Małgorzata Handzlik havas du filinojn en la aĝoj de 10 kaj 13 jaroj.

Małgorzata Handzlik laŭ la ĝisnunaj informoj estas la sola esperantisto, kiu elektiĝis al la eŭropa parlamento. Tamen ankaŭ en Francio la esperantistoj havis sukceson en la elektoj. La listo "Eŭropo Demokratio Esperanto" ricevis ne nur atenton de la amaskomunikiloj, sed ankaŭ pli ol 25.000 voĉojn. Tamen tiu kvanto, kiu egalas al proksimume 0,15 procentoj, ne sufiĉis por loko en la nova eŭropa parlamento, kiu kolektiĝos en Bruselo en julio.

komuniko ĉerpita el « *Libera Folio* »

<http://www.liberafolio.org>

foto-konkurso



Post ses sukcesaj konkursoj (1998, 1999, 2000, 2001, 2002, 2003) la redakcio de *La Ondo de Esperanto* invitas al partopreno en la sepa *Internacia Fotokonkurso*.

La konkurso ne estas ligita al deviga temo.

En la konkurso rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono.

Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 10×15 cm . Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj .

La konkursaj fotoj devas esti senditaj unuekzemplere al la sekretario de la konkurso :

== **Halina Gorecka (RU 236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando)** ==

La fotoj devas atingi la sekretarion de la konkurso antaŭ la 1a de decembro 2004 .

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj, kiuj jam estis premiitaj aŭ publikigitaj.

La juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1/ - 50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto 2005*.

2/ - 25 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto 2005*.

3/ - Abono de *La Ondo de Esperanto 2005*.

Specialan premion (libroj de *Sezonoj* kontraŭ ekvivalento de 50 eŭroj) ricevos la plej bona foto teme ligita kun Esperanto.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2004. La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31a de decembro 2006 uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj.

Sukcesojn!

-----Halina Gorecka & Aleksander Korĵenkov *La Ondo de Esperanto / Sezonoj / Balta Esperanto-Forumo / Liro RU-236039 Kaliningrad ab. ja. 1248, Ruslando Rete: sezonoj@gazinter.net Eo: <http://www.esperanto.org/Ondo/> Ruse: <http://users.gazinter.net/sezonoj/> Dissendolisto: http://groups.yahoo.com/group/La_Balta_Ondo/*



... Kio estas " SOLVILO " ?

Karaj abonantoj :

Al ni ĉiuj malplaĉas ne sukcesi finplenumi vortkručenigmon...

Tio neniam plu okazos al vi, se vi uzos la programon SOLVILO, kiu montras la diversajn solvojn eblajn por plenumi kadrojn.

Ĝi montriĝos ankaŭ tre utila en diversaj cirkonstancoj, kies plezuron malkovri ni lasas al vi.

Ligo en la rubriko *Aliaj Programoj* de la TTT-ejo de *La Vortaro*: <http://www.la-vortaro.net> ebligas al vi vidi kaj elŝuti la programon !

SOLVILO funkcias sub *Vindo* ekde la versio 98.

Bonajn vortkruĉsolvadojn

Ĝis!

Bernard(o)

someraj renkontoj

BOURESSE (FR-86410) – staĝejo « kvinpetalo »

tel / faks (33) 05 49 42 80 74

La Centro konsistas el pluraj kamparaj dometoj ĉirkaŭantaj herban korton.
Ĝi enhavas interalie 14 dormoĉambrojn, 2 manĝoĉambrojn (kun kamenoj!) kaj 2 klasĉambrojn.
Ĝi povas akcepti **dudekon da staĝanoj samtempe.**



TARIFO 2004

valida por ĉiu staĝo

Aliĝo (kurskotizo)	24 €
Tut-staĝa tranoktado	32 €
Ĉiu matenmanĝo	4 €
Ĉiu tagmanĝo	8 €
Ĉiu vespermanĝo	5,50 €

SYM-kotizoj (Societo Yvonne Martinot)

Jarkotizo	10 €
Dumviva membreco	150 €

Programo - somero 2004

Julio 7a - 11a	Vivo kaj historio de pupoj , kaj vestokudrado por bebopupoj 'Petitcolin' Bildstrioj pri la pupoj (aŭ aliaj temoj laŭ la ĉeestantoj).	Evelyne Boilaux Hartmut Fielmann
Julio 13a - 17a	Perfektigi sian prononcon per registriloj (minimuma kono de la lingvo estas necesa) Produkto de KD laŭ la tekstoj studataj.	Serge Sire Josée Lafosse
Julio 20a - 24a	Esperantaj gramatikaĵoj , kiujn Zamenhof ne solvis. Kun tasketoj por la kursanoj...	Wim Jansen
Aŭgusto 6a - 11a	Pri muziko kaj kantoj , kun praktikado de Esperanto.	A-Sophie Markov Guillaume Ternant
Aŭgusto 17a - 21a	Preparado al Altaj Studoj : kun ebleco trapasi la skriban parton je la staĝofino.	Janine Dumoulin ???
Aŭgusto 17a - 22a	Malkovro de Romanika arto en Piktavio (t.e. en Poitou).	Claude Nourmont Brian Moon
Septembro 9a - 16a	Apudbeletro en Esperanto : biografioj, taglibroj, vojaĝrakontoj, leterkolektoj... Piedmigrado	Ed Borsboom Monique Dussenty Thérèse Pinet
Oktobro 26a - 30a	Praktikado de la lingvo : dua kaj tria niveloj.	

N.B. La datoj de la staĝoj indikas la unuan kaj la lastan tagojn. Oni prefere alvenu la antaŭan tagon.
(notu, ke vespermanĝoj kutime okazas je la 7-a 1/2)

Kosto de ĉiu unusemajna stago (1/2 prezo gis 16 jaroj)	27,50 €
Kotizo por kulturaĵ elspezoj (validas 1 jaron)	7,50 €
Loĝado (prezoj por unu tago) (<i>novaj litoj + ĉambroj estis renovita</i>)	
ĉambro por unu persono	15,50 €
ĉambro por du personoj	23,00 €
ĉambro por tri personoj	33,00 €
ĉambro por kvar personoj	40,00 €
komuna dormejo	7,50 €
Tendurmejo (sen elektro) por unu persono por ĉiu alia persono de la familio	4,50 € 3,00 €
Mango (1/2 prezo gis 16 jaroj)	
malmango	2,50 €
tagmango	8,00 €
vespermango	7,50 €
malvarma mango - pikniko	4,50 €
Prix de chaque stage hebdomadaire (1/2 tarif jusqu'à 16 ans) Cotisation pour frais culturels (valable pour 1 an)	
Hébergement (lits neufs + chambres rénovées)	
chambre individuelle	
chambre pour 2 personnes	
chambre pour 3 personnes	
chambre pour 4 personnes	
dortoir	
Camping (sans électricité) pour une personne pour chaque autre personne de la famille	
Repas (1/2 tarif jusqu'à 16 ans) petit déjeuner déjeuner dîner repas froid - pique-nique	

ALIĜILO / BULLETIN D'INSCRIPTION

Nomo: Nom
Adreso: Adresse

..... Ago/Age

2 Dato de la stago: Dates du stage
Mi interesiĝas pri la kurso de: Je suis intéressé(e) par le cours de
Nombro de personoj: Nombre de personnes
Mi loĝos en cambro 1/2/3/4/+litoj Logement en chambre de 1/2/3/4/+ lits
Mia la tranoktado estos: Ma tère nuit commencera
Mangoj / Mia 1 mango Vegetarano / Aliaj _____
Repas / Mon 1er repas débutera Végétarien / Autres _____
Transporto: mi venos aŭte / mi proponas _____ sidlokojn buse
Transporto: je viens en voiture / je propose _____ sidlokojn en bus
Mi pagas la aliĝkostojn per ĉi-kuna ĉeko en la sumo de €
 UEA-konto **gres-y** kun indiko aliĝo Grezjiono €
Je joins un chèque postal/bancaire au nom de la Maison Culturelle Espérantiste €


Oni sendu aliĝojn kaj ĉekojn al: Veuillez envoyer vos inscriptions et chèques à :
Maison Culturelle de l'Espéranto F-49150 BAUGE

Bonvolu sendi internacian respondkuponon se vi bezonas konfirmon pri via aliĝo; dankon. N'oubliez pas de joindre un timbre si vous désirez recevoir la confirmation d'inscription ; merci.

Dato/date :

Subskribo/signature :

KULTURDOMO DE ESPERANTO MAISON CULTURELLE DE L'ESPERANTO



Kastelo Grezjiono / Château de Grésillon
49150 BAUGE Francio / France

☎ + Faksso/Fax : +33 (0)2 41 89 10 34

ret-mesaĝo/courriel : grezjiono.kastelo@free.fr
ttt-ejo/site : <http://grezjiono.kastelo.free.fr>

La senprofitcela asocio
"Kulturdomo de Esperanto"
fondita en 1951, posedas la
kastelon Grezjiono kaj
ĝian 18-hektaran parkon.

- Ĝi organizas au gastigas:
- ♦ kursojn diversgradajn
 - ♦ prelegojn diversstajajn
 - ♦ distraĵojn diversspecajn
 - ♦ ekskursojn en belega regiono

- Ĝi disponigas al la staganoj:
- ♦ kurso-cambrojn,
 - ♦ salonojn
 - ♦ ampleksan bibliotekon
 - ♦ riĉan libroservon
 - ♦ butikon kaj trinkejon
 - ♦ sportejoj (tablo-teniso, flugpilkio, 2 mĝradpadoj...)

L'association à caractère coopératif
"Maison Culturelle de l'Espéranto"
fondée en 1951, est propriétaire du
château de Grésillon et de son parc de
18 hectares.

- Chaque année elle propose :
- ♦ des cours de la langue internationale (divers degrés)
 - ♦ des conférences
 - ♦ des distractions variées
 - ♦ des excursions dans une très belle région

- Elle met à la disposition des stagiaires :
- ♦ des salles des cours, des salons
 - ♦ une bibliothèque importante
 - ♦ un riche service de librairie
 - ♦ une boutique et un bar
 - ♦ des équipements sportifs (tennis de table, volley, 2 sentiers de randonnées...)

PROGRAMO 2004

PROGRAMME 2004

KIEL ATINGI GREZIJONON?

- **Traine:**
Inter la urboj Le Mans kaj Saumur, post trajno, la busoj haltas en Baugé (Boje) (sed ne dimanĉe. Antaŭanoncu vian alvenon, iu venos veturigi vin el Boje.
- **Aŭtomobile:**
Baugé situas ĉe la vojkruĉo de du grandaj vojoj: Angers - Tours (N23 - D766) kaj Le Mans - Saumur (N23 - D135). De Baugé al la kastelo, sekvu la vojon D187 al Le Lude. Grezjono situas je 2 km de Baugé

JARPROGRAMO EN LA KASTELO


- 14 → 21/08 Sentema semajno (ripoz)
- 21 → 28/08 Verda bicikla semajno
- PROGRAMO DE L'ANNEE AU CHATEAU**
26/4-3/5 semaine sans thème (repos)
- 21 → 28/08 Vélo vert en Anjou

LA STAĜO

- Komenco :**
- staĝo: sabaton je la 19-a horo
- kursoj: dimanĉon
- Okazado**
- 4 / 5 horoj da kursoj tage
- aktivaĵoj (esperante): malkovro de la regiono, prelegoj, laborejoj (laŭ la staĝoj)
- Fino**
- kursoj: vendredon vespere
- staĝo: sabaton tagmeze (manĝado opcie)

COMMENT VENIR ?

- **Par le train :** Entre Le Mans et Saumur circule un autobus de la SNCF qui s'arrête à Baugé. Annoncez-nous l'heure de votre arrivée lorsqu'un vous attendra à Baugé. Attention : pas de bus le dimanche pour Baugé !
- **Par la route :** Baugé se situe à l'embranchement de 2 grandes routes : Angers-Tours (N23 D766 et Le Mans-Saumur (N23-D135). De Baugé au château (2 km) prendre la route D817 vers Le Lude. Grésillon se situe à 2 km.



LE STAGE

- Début**
- stage : samedi 19 h
- cours : dimanche
- Déroulement**
- 4 à 5 heures de cours par jour
- activités (en espéranto) : découverte de la région, conférences, ateliers (selon les semaines)
- Fin**
- cours : vendredi soir
- stage : samedi midi (repas optionnel)

SOMERSTAĜOJ / STAGES ESTIVAUX 2004

Provizora programo (krom ŝanĝoj) / Programme provisoire (sauf changements)

DAŬO	GRIZONO	ALIAJ KURSOJ
3 → 10 julio/juliet	1 2	▫ Lala Rilalarisoo ▫ Carlo Bourliot
10 → 17 julio/juliet	1 2 +	▫ Lala Rilalarisoo ▫ Carlo Bourliot ▫ André Cherpillod ↗
17 → 24 julio/juliet	1 2 3/4	▫ Vincent Charlot ▫ Mitou Lioancy ▫ Francisko Simonnet (konfirmota)
24 → 31 julio/juliet	1 2 3	▫ Lala Rilalarisoo ▫ Carlo Bourliot ▫ Francisko Simonnet (konfirmota) ↗
31 julio/juliet ⇨ 7 agosto/aoŭt	1 2 3	▫ Lala Rilalarisoo ▫ Carlo Bourliot ▫ Mitou Lioancy
7 → 14 augusto/aoŭt		Jean-Luc Tortel ▫ Marie Savary: okcidenta joko (komencantoj kaj spertuloj) / yoga occidental (débutants et confirmés)

★ 14 → 21 *augusto/aoŭt* Sentema semajno / Semaine sans thème
★ 21 → 28 *augusto/aoŭt* Verda bicikla semajno / Vélo vert en Anjou

**Internacia Esperanto-Konferenco 2004
Pécs (Baranya, Hungario) 17-23.07.2004**

ALIĜILO

Persona kaj familia nomoj
 Naskiĝdato Adreso
 Poŝta kodo Urbo
 Lando Tel.
 Fako Retadreso
 Poŝtelefono Mi bezonas invitleteron
 Mi estas: viro virino vegetarano fumanto
 Mi venos trajne aŭtobuse aviadite aŭtomobile kun:

Mi partoprenus sempagan kurseton de esperanto hungara
 Mi petas la informojn pri la postkonferencaj ekskursoj
 Aliaj miaj sciigoj / demandoj / sugestoj

Mi pagas: aliĝkotiĝon €
 membrokotiĝon OSIEK 2004 €
 por solidareca fonduso €
 loĝadon - eventuale, laudezira rezervosumo por: €
 sume: €


Mi pagis (por IEK) al la konto de Orbis Pictus de V. Branković ĉe:
 IT / Unicredit Banca: IT 72 S 02008 02241 000005590557
 IT / BancoPosta (pék): IT 31 A 07601 02200 000023352354
 B / FEL: orbi-s NL / UEA: orpi-o (nur fruaj enpagoj)
 Francio pék (poŝĉekkonto) de Eric Laubacher: 1 399 87 R Paris
 Hungario: poŝtmandato al József Németh, Toldi u.7. 7621 Pécs
By: aldoni 10 € por bankokostoj kaze de ebleco 1 aŭ 2
 Dato de mia pago: _____ Subskribo _____

BONVOLI RESENDIALI:

ORBIS PICTUS de Visnja Branković - Via Pami 5
 IT- 34129 Trieste, Italio tel/fax: + 39 040 767 875
 orbispictus@iol.it (eventuale: visnja.brankovic@os.hinet.hr)



**Internacia Esperanto-Konferenco 2004
Pécs (Baranya, Hungario) 17-23.07.2004.**



Esperanta gazetaro

Postkonferencaj ekskursoj tra la regiono
23-26.07.2004.

Bonvenon al Pécs! La dumiljara Pécs estas unu el la plej belaj kaj gravaj urboj en Hungario, konata ankaŭ kiel urbo de kulturo kaj arto, pro siaj muzeoj, arta vivo, festivaĵoj, vaste konataj artistoj... Ĝi estas ankaŭ universitata urbo, en kiu fondiĝis la unua hungara universitato, en 1367. Ĝiaj monumentoj el la romia kaj la turka epokoj en la jaro 2000 estas proklamitaj *monda heredaĵo*, sub la protekto de UNESCO. La multkultura mezŭropa urbo, kun ĉirkaŭ 162.000 enloĝantoj (hungaroj, ŝvaboj, serboj, kroatoj...) surbaze de la mediteranea klimato kreis al si ankaŭ mediteranean etoson! Precipe somere en ĝi viglas ankaŭ la ĝusta (senĝena) nombro da turistoj. *Ni invitas ankaŭ vin ĝui la interesajn kaj agrablajn de Pécs!*

Programo de IEK 2004 - "Esperanta gazetaro"

estas la vasta temo sub kiu okazos la *prelegoj kaj distaŭtojdum* la antaŭtagmezoj de lundo ĝis jaudo. Ĝusta temo en la ĝusta momento kaj loko! Dum krizas aŭ ŝanĝas la formon esperanta informado, ĉion eblas pridiskuti en la lando de *Eventoj, Ret-Info, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, Naturista vivo, Debrecena bulteno, Literatura Mondo, Budapeŝta Informilo*... Tute najbare al Hungario aliajn gravajn gazetojn redaktis aŭ redaktas *Herbert Mayer, Spomenka Štimec, Stano Marček*... Jam konate altkvalita prelegantaro de IEK-oj havos valoran plifortigon!

Aliaj programeroj: voĉdonado por OSIEK-premio, prelegoj pri la urbo kaj la regiono, vizito al priesperanta kaj aliaj muzeoj, distro, kulturo, turismo... enurbe, arbare, banloke

Postkonferencaj ekskursoj - aldona tritaga restado gvidos vin pli leĝere tra la milda regiono kaj ĝiaj montetoj, kasteloj, termalbanejoj, vinkeloj, malnovaj protestantaj preĝejoj, naturparkoj ... kun la ebleco viziti la najbaran ĝemelurbon de Pécs – Osijek en Kroatio!

Aliĝu nun

Aliĝi estas simple:

- ☉ plenu la aliĝilon kaj enpagu la konferencan kotizon
- ☉ sendu al ni la aliĝilon kun la konfirmilo pri la enpago

Kotizoj de IEK 2004

Kategorio / aliĝdato	29.02.2004.	30.04.2004.	poste
membro OSIEK	60 €	75 €	100 €
nemembro OSIEK	75 €	90 €	115 €

Validas la alvendato de la pago al nia konto. La kotizo estas ne repagebla.

La konferenca kotizo ne inkluzivas: loĝadon, manĝojn, asekuron, nek ion alian kio ne estas aparte indikita. *Ĝi inkluzivas:* la organizajn elspezojn kaj laborojn, konferencajn materialojn, la partoprenon en la programo kaj gvidotajn vizitojn.

Rabatoj: 50% por junuloj ĝis 26-jaraj kaj por handikapuloj 30% por samadresa kumulo de la aliĝinto

Subvencioj al partoprenantoj el nepagipovaj landoj, depende de la eblecoj de la organizanto kaj la solidareca fonduso.

Loĝado kaj manĝoj: *ĉiuj aliĝintoj ricevos la mendilon kun detalaj informoj kaj konsiloj.* La eblecoj estas por diversaj gustoj kaj poŝoj. Krom la konferenceja hotelo, tristela (ĉ. 28 € en duliĝa kaj 39 € en unulita ĉambro) kaj la najbara, iom pli kosta, eblos loĝi ankaŭ en la studenta hejmo (ĉ. 10 € en duliĝa ĉambro) kaj, laŭpete, malplikeste kaj pli modeste, en multlitaj ĉambroj.

Membreco al OSIEK (2004), se dezirata:

kotizo = valoro de 25 poŝtmarkoj por vialanda norma letero

www.tourinform.hu

www.hungarytourism.hu

www.osiek.org

56ème Stage régional d'Espéranto

27ème séminaire de BAVELO

esperanto
France-Est

Vendredi 8, samedi 9 et dimanche 10 octobre 2004
Burg Teck 73277 Owen/Teck (25 km à l'Est de Stuttgart)
Tel. 07021-55208, Fax 07021-862012

Programme

vendredi, 8 octobre 2004

17.00 Visite à l'entreprise **Leuze electronic** (à Owen près de la gare)
19.00 repas
20.30 Bienvenue! Faisons connaissance!

samedi, 9 octobre 2004

08.00 petit déjeuner
09.00 - 11.45 cours
12.00 déjeuner, puis promenade et visite à Owen, ou piscine ou messe oecuménique (14.30-15.30)

17.00 - 18.30 cours

18.00 repas

20.00 - 21.30 cours

dimanche, 10 octobre 2004

08.00 petit déjeuner

09.00 - 11.45 cours

12.00 Départ.

Possibilité de déjeuner au château ou lors de la visite à Kirchheim (très belle ville).

Frais de séjour par personne:

(2 nuitées + tous les repas pour 1 personne)

60 € 1 lit au château

80 € chambre à 1 lit (Douche/WC)

100 € chambre à 2 lits (Douche/WC)

Prix par famille au château

150 € pour toute une famille parents et enfants)

Pour jeunes: 20 € pour le cours D

(membres de GEJ 13-17 ans)

Organisé par BAVELO

Baden-Virtembergga Esperanto-Ligo

Cours

A 2 Faux débutants - (Edmilson L. Serejo)

Pour débutants ayant une petite pratique de la langue. Conversations simples et exercices

P Cours de conversation (André Grossmann)

Recommandé à tous ceux qui ont déjà appris l'espéranto, mais sentent un manque dans la pratique oral.

K Cours pour enfants (Alois Eder)

En jouant, en chantant, en bougeant les enfants de 6 à 13 ans auront du plaisir à s'initier à l'espéranto.

A1 B D J (voir la texte en espéranto)

Le château Teck avec son site magnifique vous invite.

Le château fonctionne comme une auberge de jeunesse, nous aurons donc un peu moins de confort que d'habitude, - mais d'autant plus d'ambiance!!! Pour les personnes qui préfèrent le confort, nous proposons l'hôtel Teckblick dans la ville voisine Dettingen. Il ne sera pas possible de stationner près du château (sauf pour les personnes handicapées ayant un document officiel, veuillez nous faire savoir si vous êtes concernés) les autres personnes auront la chance de faire un peu d'exercice physique, c'est à dire un quart d'heure de promenade du parking Hörnle au château.

Grâce à la coorganisation du "programme jeunes" BAVELidO notre programme est plus riche que d'habitude.

- Le thème principal du "**Bukeda kurso**" sera l'agrandissement de L'Union Européenne, présenté par deux présidents: Andreas Emmerich de GEA, et Michael Scherm de AGEI (Enseignants Espérantophones).
- Visite d'une entreprise d'outils électroniques, décodeurs à codes barre.
- Une série de cours, pour débutants, progressants, enfants, jeunes (env. 10 ans).
- Comme d'habitude nous avons prévu du beau temps.
- Venez et profitez de l'ambiance internationale.

Kiel atingi la kastelon Teck?

La kastelo situas sur alta montopinto. De la parkejo "Wanderparkplatz Hörnle" oni atingas ĝin per ĉ. 15-minuta piedirado supren. Sur ĉi-tiu vojo oni rajtas veturi per aŭto nur kun aparta permesa dokumento.

pertrajne: ĝis stacio Owen/Teck. Ni klopodas instali veturigan servon de la stacidomo ĝis parkejo Hörnle (3 km), tial bonvolu anonci la alventempon de via trajno. Kiu ne povos alveni ĝis la 19a bonvolu alvoki "0172-2668339 Julia Noe".

per aŭte: ekspresvojo Stuttgart-München, elirejo Kirchheim/Teck-Ost. De la centro de urbeto Owen sekvu la ŝildojn "Burg Teck" ĝis parkejo "Wanderparkplatz Hörnle". De tie piedirado (estu ŝparemaj pri kofroj! ;-)



Comment arriver au château Teck?

Le château est situé au sommet d'une colline, accessible à pied à partir du parking "Wanderparkplatz Hörnle", petite montée de 15 minutes. Ce chemin n'est autorisé aux voitures particulières qu'avec autorisation spéciale.

Par train: jusqu'à la gare de Owen/Teck. Nous nous efforcerons de créer une navette de la gare jusqu'au parking Hörnle (3 km). Veuillez annoncer l'heure d'arrivée de votre train. Après 19h veuillez nous appeler au "0172-2668339 Julia Noe".

En voiture: autoroute Stuttgart-München, sortie Kirchheim/Teck-Ost. Du centre de la ville Owen suivre les panneaux "Burg Teck" jusqu'au parking "Wanderparkplatz Hörnle". De là à pied vers le château (n'ayez pas trop de valises! ;-)

56a Regiona Staĝo de Esperanto

27a BAVELO-seminario



France-Est

Vendredon la 8an, sabaton la 9an kaj dimanĉon la 10an de oktobro 2004
Burg Teck 73277 Owen/Teck (25 km oriente de Stuttgart)
Tel. 07021-55208, Fax 07021-862012

Organizata de BAVELO
 Baden-Virtemberga Esperanto-Ligo

Sur la kruta flanko de la *Švaba Juraso* la elstara kastelo TECK rigardas en belegan pejzaĝon. Ni staĝos en belkolora aŭtuno kune kun la Esperanto-junularo BAVELIdO. Bonega etoso atendas vin.

Programo

vendredo, 8a oktobro 2004

17.00 vizito de firmao *Leuze electronic* (en la urbeto Owen, proks. stacidomo)
 19.00 vespermanĝo
 de 20.30 Bonvenon! Konatiĝo

sabato, 9a oktobro 2004

08.00 matenmanĝo
 09.00-11.45 kursoj
 12.00 tagmanĝo, poste komuna promenado al Owen, ekumena diservo (14:30-15:30) aŭ urborigardado aŭ naĝejo aŭ
 17.00-18.30 kursoj
 19.00 vespermanĝo
 20.00-21.30 kursoj

dimanĉo, 10a oktobro 2004

08.00 matenmanĝo
 09.00-11.45 kursoj
 12.00 Adiaŭo
 Poste eblas tagmanĝi en la kastelo aŭ survoje, dum vizito al la bela urbo Kirchheim.

Belege situanta kastelo Teck invitas vin.

La kastelo estas ekipata en stilo de junulargastejo, do ni havos iom malpli da komforto ol kutime, - sed des pli da etoso!!! Por komfortemuloj ni proponas tranoktadon en hotelo *Teckblick* en la apuda urbeto Dettingen. NE eblas parki en la kastelo mem (escepte por handikapuloj kun oficiala dokumento - bonvolu sciigi nin, se tio koncernas vin), do ni prenu la ŝancon al iom da korpaj ekzercado, nome kvaronhora promenado de parkejo Hörnle, sed tiu peno vere valoras.

Danke al la kunorganizado de la Esperanto-junularo BAVELIdO nia programo estas pli riĉa ol kutime:

★ Ĉefa temo de la bukeda kurso do estas la pligrandiĝo de Eŭropa Unio. Prezentos la temon du prezidantoj: Andreas Emmerich, prezidanto de GEA, kaj Michael Scherm, prezidanto de AGEI (Esperanto-instruistoj).

★ vizito de interesa firmao de elektronikaj iloj por deĉifri streko-kodajn etikedojn.

★ Krom tio atendas vin la spektro de apartaj kursoj por komencantoj, progresantoj, por infanoj kaj por "dek'iom'uloj".

★ Kiel kutime ni atendas belegan aŭtunan veteron.

Venu kaj vidu kaj ĝuu la apartan etoson.

Antaŭviditaj kursoj kaj petitaj gvidantoj

A 1 Débutants / komencantoj - (Elisabeth Denzler)

Unua konatiĝo kun la lingvo kaj ĝiaj avantaĝoj. La bazaj trajtoj de la Esperanta gramatiko, unuaj frazoj. Kiel apliki Esperanton? Konatiĝo kun la plej favoraj proponoj de la Esperanto-movado, ekzemple Pasporta Servo.

A 2 Faux débutants / komencantoj - (Edmilson L. Serejo)

Por komencantoj, kiuj jam iomete okupiĝis pri la lingvo. Simplaj konversacioj kaj ekzercoj.

P Paroliga kurso (André Grossmann)

Rekomendinda por ĉiuj, kiuj jam okupiĝis pri Esperanto, sed sentas mankon de praktikado kaj parolado. La temoj allogas vian intereson.

B Bukeda kurso

Ĉi-kurso estas bukeda por ĉiuj, kiuj jam regas Esperanton. Ĉefa temo: La nova Eŭropo post la pligrandiĝo - politikaj, lingvaj, ekologiaj aspektoj. Referantoj: Andreas Emmerich, prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, Michael Scherm, prezidanto de AGEI - Esperanto-instruistoj, D-ro Manfred Westermayer. Pliaj temoj: - Moderna itala literaturo (Scherm), - Perspektivoj de GEA (Emmerich)

K Infankurso (Alois Eder)

Per ludado, kantado, moviĝo infanoj de 6 ĝis 13 j. ĝuos Esperanton.

D Tinis / dekiomuloj (Dorothea Hüfler, Katrin Schellenberger)

Kurso por lernejoj-komencantoj. Rapida progreso kun amuzaj kaj interesaj materialoj.

J Junulara programo (Janek Bender)

La junulara programo - uzu apartan aliĝilon - estas prizorgata de BAVELIdO. Bonvolu kontakti: Janek Bender, Senefelderstr.10, DE-73230 Kirchheim-Teck,

Tel.: +49-7156-437777, rete: janekbender@epost.de

Kostoj popersonaj por tranoktado kaj manĝoj:

(2 tranoktoj, plena pensio ĝis dimanĉo matene)

60,00 € etaĝa lito en la kastelo

80,00 € dulita ĉambro (du/nec) en hotelo

100,00 € unulita ĉambro (du/nec) en hotelo

Aparte favorpreze ... por familioj tranoktantaj en la kastelo: 150,00 € totalsume por la familio = gepatro(j) kun ĉiuj infanoj.

... por junuloj (dek'iom'uloj) :

20 € por partoprenantoj de kurso D (GEJ-membroj, 13-17-jara)

Baden-Virtemberga Esperanto-Ligo kaj IKUE-AG, Freiburg

Orient-Franca Esperanto-Federacio

Aliĝilo

invitas vin al

vous invite au

Bulletin d'adhésion

27a BAVELO-seminario

56a Regiona Staĝo de Esperanto

56° Stage Régional d'Espéranto

8a - 10a oktobro 2004

8 - 10 octobre 2004

en Teck en Germanio

à Teck en Allemagne

Mi volas partopreni jenan kurson: Je participe au cours suivant:
 A1 A2 P B K D
Tranoktado ... en kastelo Teck Nuitées au château Teck
 plurlita ĉambro (etaĝo-litoj, duŝo trans la koridoro) *chambre à plusieurs lits (lits superposés et douche à part)*
 ____ infano(j) *enfant(s)* junulo (dek'iom'ulo) *jeune (env. 10 ans)*
 familio: (____ plenkreslulo(j) kaj ____ infano(j) *famille ____ adultes et ____ enfant(s)*)
en hotelo Teckblick en la valo à l'hôtel Teckblick dans la vallée (Teckstraße 44, 73265 Dettingen/Teck, +49-7021-83048)
 1-lita ĉambro kun duŝo/necesejo *chambre à 1 lit (Douche/WC)*
 2-lita ĉambro kun duŝo/necesejo *chambre à 2 lits (Douche/WC)*
Manĝado:
 Mi volas manĝi vegetare. Jes Ne sen manĝoj

Je veux manger végétarien oui non sans repas

Mi mendas unuopajn manĝojn: matene (7 €) tagmeze (8 €) vespere (7 €)

Je commande à part petit déjeuner déjeuner dîner

vendrede

sabate

dimanĉe

 ne inkluzivita aparte pagenda) (*non inclus, payable à part*)
Bonvolu resendi la aliĝilon al*Bulletin à retourner à*

S-ro Edmond LUDWIG

26, route de la Schlucht

68140 STOSSWIHR

Tel. 03.89.77.52.56

Ret.adreso: take.ladomo@wanadoo.fr

Aliĝ-kotizo

- plenkreskuloj 25 €
- junuloj (13 - 17- jaraj) 10 €
- familioj (gepatroj kaj ĉiuj infanoj kune) 25 €

La kotizo kovras kurson laŭ via elekto Bonvolu ĝiri la kotizon al la sube menciita konto. Ĝi ne repageblas je malaliĝo. La aliĝo validas nur post ricevo de la kotizo en la jena konto:

TAKE CCP 2 429 78 S Strasbourg.

Bonvolu ĝiri vian kotizon frue. Dankon.

Frais d'adhésion

- adulte 25 €
- jeune (13 - 17 ans) 10 €
- famille (parents et enfants) 25 €

La cotisation comprend la participation au cours choisi. Elle est à payer au compte ci-après et n'est pas remboursable. L'adhésion est valable après réception de la cotisation.

TAKE CCP 2 429 78 S Strasbourg.

Veuillez payer votre cotisation au plus tôt. Merci.

S-ro S-ino M. Mme	Familia nomo <i>Nom de famille</i>	Persona nomo <i>Prénom</i>	naskiĝ-jaro <i>année de naissance</i>	Elektita kurso <i>Cours choisi</i>
1				
2				
3				
4				

adreso *adresse*telefono *téléphone*ret-adreso *courriel*

Pagoj : kotizo

+ restado

=sumo

paiement: cotisation

+ séjourn

=total

1. junio - 30. septembro

Sud-Nigramara Esperanto-Somerumado po du semajnoj. Inf: Lasto Nikov, BG-1000 Sofio, P.K.497, Bulgario. Tel.: +359-2-9835084, +359-2-318840, posxtelefono: +359-887-303427. Rete: lasto@mail.bg aŭ lasto11@yahoo.co.uk

11 - 18. junio

Busvojaĝo al 14-a Eŭropa Esperanto-Forumo en Benelukso. Inf: Internacia Klubo "Esperantotur", str. M.Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Polio. Tel/fakso +48-52-3461151. Rete: turismo@bydgoszcz.pdi.net

11 - 13. junio

20-a Studadsesio en Herzberg am Harz. Inf: Esperanto-Centro, DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 8, Germanio. Tel/fakso: +49-(0)5521-1363, +49-(0)5521-71123, rete: zilvar@t-online.de

12 - 13. junio

52-a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo, Japanio. Inf: kleg@mvf.biglobe.ne.jp

18 - 24. junio

Internacia Esperanto-Renkontiĝo en Armenio. Inf: Armenia Esperanto-Asocio, karinko_arm@yahoo.com aŭ Bella.Karapetian@wfp.org

21. junio - 16. julio

Busvojaĝo al Nordkapp kaj 40-a BET (Baltaj Esperanto-Tagoj) en Litovio. Inf: Internacia Klubo "Esperantotur", str. M.Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Polio. Tel/fakso +48-52-3461151. Rete: turismo@bydgoszcz.pdi.net

22 - 27. junio

Folkloro renkontiĝo en bieno Ŝlokenbeka. Inf: Māra Timermane, Kr. Valdemāra 145/1-32, LV-1013 Rīgā, Latvio. Tel. +371-9115413. rete: mtimermane@yahoo.com

29. junio - 3. julio

Verkosemajno de la Esperantlingva Verkista Asocio en **Bouresse** en Kulturcentro de **Kvinpetalo** (Francio). Inf: [Anna Löwenstein](mailto:Anna.Löwenstein) (*vidu aliloke en ĉi-tiu bulteno*)

30. junio - 5. julio

Frusomera Renkontiĝo Esperanta Ŝokanta Obstinulojn (t.e. E-kviza okazintaĵo kun premioj): Inf: Marian Zdankowski, ul. Limanowskiego 4, PL-10-343-Olsztyn, Polio. Rete: avolamer@ols.vectranet.pl aŭ angiel@polbox.com

2 - 8. julio

REJO-3 - Renkontiĝo de Esperantista Junularo en Kievo - Junulara renkontiĝo por ĉiuj, kiuj sentas sin juna! Inf: Mikaelo Lineckij, p.k. 91, Kiev-201, UA-04201, Ukrainio. Tel: +380-44-4320743. Rete: REJO aŭ [Mikaelo Lineckij](mailto:Mikaelo.Lineckij)

3. julio

Memorfesto de Seula Esperanto-Kulturcentro, Koreio. Informoj kaj gratulmesaĝoj: esperant@unitel.co.kr

3 - 10. julio

57-a kongreso de IKUE en Kretinga, Litovio. Inf: Esperanto-Asocio, p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio. Telefakse: +370-37-228616, rete litova.ea@mail.lt

3 - 10. julio

Somerstaĝoj en Grezijono. Inf: Kulturdomo de Esperanto, Kastelo Grezijono, FR-49150 Baugé, Francio. Tel : +33-(0)241891034, Fakso: +33-(0)241825522. Rete: Kulturdomo de Esperanto, Kastelo Grezijono (*vidu aliloke en ĉi-tiu bulteno*)

3 - 16. julio

Busvojaĝo al 57-a IKUE-Kongreso en Kretinga (Litovio) kaj 40-a BET (Baltaj Esperanto-Tagoj) en Litovio. Inf: Internacia Klubo "Esperantotur", str. M.Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Polio. Tel/fakso +48-52-3461151. Rete: turismo@bydgoszcz.pdi.net

3 - 21. julio

Somerstaĝoj en Grezijono. Inf: Kastelo **Grezijono**, FR-49150 Baugé, Francio. Tel: +33-0241891034. Rete: grezijono.kastelo@free.fr (*vidu aliloke en ĉi-tiu bulteno*)

5 - 9. julio

Kursosemajno en ĉe Popola Instituto de Valamo, Heinävesi, orienta Finnlando. Inf: Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) Tiina Oittinen, sekretario de EAF, Puutarhakatu 26 A 11, SF-20100 Turku, Finnlando, tel: +358-(0)2-2305319, rete: eafsekretario@esperanto.fi

5 - 10. julio

Naturamika Semajno en Grindelvaldo (Berna Kantono) kun Francisko Degoul. Inf: Kultura Centro Esperantista, C.P. 311, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio. Tel/fakso: +41-32-9267407. Rete: kce.esperanto@bluewin.ch

5 - 10. julio

ILK - OKSEJT-44 (Internacia Lingva Kurso - ?) antaŭkongresa instrutendaro en Rusio-. Inf: OkSEJT aŭ [Aleksandr Blinov](mailto:Aleksandr.Blinov)

5 - 23. julio

Nord-Amerika Esperanto-Kursaro (NASK) en Battleboro, Vermont, Usono. Inf: Ellen M. Eddy, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512, USA

6 - 9. julio

Antaŭkongreso de IJK en Sanktpeterburg. Inf: LKK de IJK, Slavik Ivanov

6 - 9. julio

Antaŭkongreso de IJK en Moskvo. Inf: mak2004@mail.ru

7 - 11. julio

Vivo kaj historio de pupoj kaj vestokudrado por bebopupoj "Petitcollin" en Bouresse. Inf: Kvinpetalo Esperanto-Centro, Rue du Lavoir, FR-86410 Bouresse, Francio. Tel/fakso: +33-(0)549428074. Rete: kvinpetalo@ciub-internet.fr (*vidu aliloke en ĉi-tiu bulteno*)

8 - 11. julio

Berlina Esperanto-Semajnfino. Inf: EsperantoLand e. V., Lu Wunsch-Rolshoven, Wicdefstr. 9, DE-10551 Berlin, Germanio. Tel: +49-30-6855831. Rete: Lu@EsperantoLand.org

10. julio

Festivalo pri fiŝista supo en Baja, Hungario. Inf: bajai@eposta.hu

10. julio

Ĉeĥa Saksa Tago en Potůčky/Johanngeorgenstadt kun vizito de arĝentminejo. Inf.: Hannelore Bünger, Am Fichtbusch 32, DE-08340 Scharzenberg, Germanio. Rete: Karbe.Norbert

10 - 17. julio

60-a IJK, Internacia Junulara Kongreso en ripozejo Berjozka apud Kovrov (regiono Vladimir), Rusio. Inf: LKK de IJK, Slavik Ivanov

10 - 17. julio

Somerstaĝoj en Grezijono. Inf: Kulturdomo de Esperanto, Kastelo **Grejzjono**, FR-49150 Baugé, Francio. Tel : +33-(0)241891034, Fakso: +33-(0)241825522. Rete: Kulturdomo de Esperanto, Kastelo Grejzjono (*vidu aliloke en ĉi-tiu bulteno*)

10 - 18. julio

40-aj jubileaj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-40) en Birŝtonas. Inf: Esperanto-Asocio, p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio. Telefakso: +370-37-228616, rete litova.ea@mail.lt

12 - 18. julio

Perbicikle turisma kaj trankvila karavano ĉe la fama kanalo de **Nanto al Bresto** en Bretonio, Francio. Inf: Telefono: Valerie +33-(0)297408932, (sen 0 el eksterlando), rete: Esperanto Vannes

13 - 18. julio

Plurnivela Internacia Kursaro, unua semajno en La Chaux-de-Fonds. Inf: Kultura Centro Esperantista, C.P. 311, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio. Tel/fakso: +41-32-9267407. Rete: kce.esperanto@bluewin.ch

16. julio

Renkontiĝo de verkistoj de la Regiono Alp-Adrio en vilaĝo Hrašćna -Trgovišće, Kroatio. Inf: Spomenka Štimec

16 - 19. julio

52-a Jarkongreso de ELNA kaj kunveno de KEA en Sidney, Kanado

16 - 20. julio

Verda Kantofesto en Tukums. Inf: Māra Timermane, Kr. Valdemāra 145/1-32, LV-1013 Rīgā, Latvio. Tel. +371-9115413. rete: mtimermane@yahoo.com

17 - 21. julio

1-a Kongreso de Internacia Esperanto-Turismo en Malbork (Pollando). Kontaktadreso: augustocasquero@infonegocio.com

17 - 23. julio

Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK - Esperanta gazetararo, Pécs, Hungario. Inf: ORBIS PICTUS de Viŝnja Brankoviĉ, Via Parini 5, IT-34 129 Trieste, Italio. Tel/fakso: +39-040-767875. Rete: orbispictus@iol.it

17 - 24. julio

Somerstaĝoj kaj Eŭropa Socia Forumo en Grezijono. Inf: Kulturdomo de Esperanto, Kastelo Grejzjono, FR-49150 Baugé, Francio. Tel : +33-(0)241891034, Fakso: +33-(0)241825522. Rete: Kulturdomo de Esperanto, Kastelo Grejzjono (*vidu aliloke en ĉi-tiu bulteno*)

17 - 25. julio

NESTo - Naturista Esperantista Somera Tendaro en Niĵnij Novgorod, Rusio. Inf: Kozlov Aleksej (Lo'). RU-603003 Niĵnij Novgorod, ul. Dmitrija Pavlova, 6-104, Rusio. Tel. +7-8312-718666. boogier2@mail.ru

18 - 20. julio

Postkongreso de IJK en Ĉeboksari. Inf: LKK de IJK, Slavik Ivanov

18 - 22. julio

39-a Brazila Kongreso de Esperanto kaj 24-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso en Maceió. Temo: Esperanto en lernejo. Inf: AAE, C.P. 396, BR-57020-970 Maceió/AL. Tel: +55-(021)82-3242979. Poŝa: +55-82-88040508. Rete: esperantomaceio@click21.com.br aŭ neider@ofm.com.br

18 - 24. julio

SEZAM-3 apud Volgograd, Rusio. Inf: [Eduard Kolosov](#)

19 - 21. julio

Postkongreso de IJK en Ĉeboksari. Inf: [LKK de IJK, Slavik Ivanov](#)

20 - 24. julio

Esperantaj gramatikaĵoj kiujn Zamenhof ne solvis kun tasketoj por la kursanoj en **Bouresse**.

Inf: Kvinpetalo Esperanto-Centro, Rue du Lavoisier, FR-86410 Bouresse, Francio. Tel/fakso: +33-(0)549428074. Rete: kvinpetalo@club-internet.fr (*vidu aliloke en ĉi-tiu bulteno*)

20 - 25. julio

Plurnivela Internacia Kursaro, dua semajno en La Chaux-de-Fonds. Inf: Kultura Centro

Esperantista, C.P. 311, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio. Tel/fakso: +41-32-9267407. Rete: kce.esperanto@bluewin.ch

21. julio - 20. aŭgusto

14-a Internacia Esperanto-Kongreso en Ĉinio. Inf: Esperantotur

23 - 29. julio

Internacia Junulara Semajno, IJS - en Hungario. Inf.: Hungara E-Junularo, p.k. 87, HU-1675 Budapeŝto, Hungario. Rete: hej@eszperanto.hu. -- Senpaga/duonpaga partopreno por 2 personoj pere de Premio Melinda

23. julio - 1. aŭgusto

Flugvojaĝo al 89-a Universala Kongreso en Pekino, Ĉinio kaj al 14-a Internacia Esperanto-Kongreso (kun vizitoj al Granda Muro kaj Tianjin) (kun diversaj varioj). Inf: Internacia Klubo "Esperantotur", str. M.Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Polio. Tel/fakso +48-52-3461151. Rete: turismo@bydgoszcz.pdi.net

24 - 31. julio

89-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino. Inf: [UEA](#)

24 - 31. julio

Somerstaĝoj en Grezijono. Inf: Kulturdomo de Esperanto, Kastelo **Grezijono**, FR-49150 Baugé, Francio. Tel : +33-(0)241891034, Fakso: +33-(0)241825522. Rete: [Kulturdomo de Esperanto, Kastelo Grezijono](#) (*vidu aliloke en ĉi-tiu bulteno*)

26. julio - 8. aŭgusto

SOMERE - 2-a Somera Mezeŭropa Renkontiĝo en Kall-Krekel, Germanio. Inf: Lu Wunsch-Rolshoven, Wicelstr. 9, DE-10551 Berlino, Germanio. Tel: +49-30-6855831 Rete: somere@EsperantoLand.org

29. julio - 8. aŭgusto

13-a MELA (MEzorga LAg-umado) en Délegyháza, Hungario. Libere sen aŭ kun vestaĵoj ripozi, akvo- aŭ ŝlimbani. Inf: (poŝtelefonoj) Laca +36-30-2097864, Andi: +36-30- 2752068. inf.: mela-krokodilo@gmx.net

31. julio - 7. aŭgusto

Somerstaĝoj en Grezijono. Inf: Kulturdomo de Esperanto, Kastelo **Grezijono**, FR-49150 Baugé, Francio. Tel : +33-(0)241891034, Fakso: +33-(0)241825522. Rete: [Kulturdomo de Esperanto, Kastelo Grezijono](#) (*vidu aliloke en ĉi-tiu bulteno*)

31. julio - 8. aŭgusto

Kristana Kongreso (54-a kongreso de KELI) en ripzejo Sola Gratia, Bystřice pod Hostýnem, Ĉeĥio. Inf: Pavel Polnický, Lesní 150/VI., CZ-290 01 Poděbrady, Ĉeĥio. Tel/fakso: +420-325-615651. Rete: cea.polnický@quick.cz

31. julio - 8. aŭgusto

26-a REF (Renkonto de Esperantistaj Familioj) en Mali Idoŝ, Vojvodino, Serbio. Inf: fam. Csőke, II. Rákóczi Ferenc str. 32, -YU-24321 Mali Idoŝ, Serbio kaj Montenegro, rete: csoke@eunet.yu

31. julio - 15. aŭgusto

Malkovra Agado de Tibeto - Mistera Firsto de la Mondo - karavanado al mistera firsto Tibeto organizata de ĉinaj esperantistoj post la 89-a UK en Pekino kun E-o kiel laborlingvo. Inf: s-ro Liu Jianguo direktoro, Hefei Verdstelo Esplora Instituto pri Turismo, Langyashan Lu, Changhuai Xincun, B-Qu 3-105#, CN-230011, Hefei, Ĉinio. Tel.: +86-551-4484370, fakso: +86-551-4210414, rete: yjs00815@mail.hf.ah.cn

1 - 7. aŭgusto

Internacia Semajno de "Eniro al Tibeto" post 89 UK. Inf: Xi'an Zhiyuan Kultura Firmao Esperanta, s-ro Zuo Jun, Jinhuaabei Lu 2hao nanlou 3-302, CN-710032. Xi'an, Ĉinio. Tel/fakso: +86-29-83239619 rete: partnero@pub.xaonline.com aŭ tibeto2003@yahoo.com.cn

14 - 22. aŭgusto

Rusiaj Esperanto-Tagoj RET-04 en Tihvin, Rusio. Temo: "Nia kulturo - nia espero". Inf: Viktor Kandinskij, Pk. 2, RU-187556 Tihvin, Rusio. Rete: [Mikaelo Bronštejn](mailto:Mikaelo.Bronstejn@yandex.ru), tel: +7-812-6726093 kaj [Garik Kokoliya](mailto:Garik.Kokoliya@yandex.ru), tel: +7-095-5677007

16 - 27. aŭgusto

38-a Internacia Esperanto Feriado kun lingvaj kursoj, en Kudowa Zdrój. Inf.: Silezia Esperanto-Asocio, str. Dubois 3/1,, PL-50-208 Wrocław, Pollando. tel: +48-71-3296954, rete: wroclaw@poczta.onet.pl

17 - 22. aŭgusto

Malkovro de romanika arto en Piktavio (Poitou) en **Bouresse**. Inf: Kvinpetalo Esperanto-Centro, Rue du Lavoir, FR-86410 Bouresse, Francio. Tel/fakso: +33-(0)549428074. Rete: kvinpetalo@club-internet.fr (*vidu aliloke en ĉi-tiu bulteno*)

21 - 28. aŭgusto

Verda biciklumdo en Grezijono. Inf: Kastelo **Grezijono**, FR-49150 Baugé, Francio. Tel: +33-0241891034. Rete: grezijono.kastelo@free.fr (*aliloke en ĉi-tiu bulteno*)

21 - 28. aŭgusto

30-a Internacia Semajno de Esperanto en Sète apud Montpellier. Inf: Esperanto Kulturo kaj Progreso, 5 rue de D-ro Roux, FR-34090 Montpellier, Francio. Tel/fakso: +33-(0)467541543. Rete: jf.passarella@free.fr

22 - 31. aŭgusto

Busvojaĝo al 6-a Eŭropunia Esperanto-Kongreso en Bilbao. Inf: Internacia Klubo "Esperantotur", str. M.Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Polio. Tel/fakso +48-52-3461151. Rete: turismo@bydgoszcz.pdi.net

24 - 29. aŭgusto

Internacia Renkontiĝo kun Jarkonferenco de AEH-IKEH kaj tradicia XV-a Esperanto - Tago en Rybitví ĉe Pardubice. Inf: Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj kaj Esperanto-klubo de doktoro Schulhof, Na Okrouhlíku 953/ 21, CZ-530 03 Pardubice, Ĉeĥa Respubliko. Tel: +420-46-6611941. Rete: aeh-ikeh@volny.cz

25 - 29. aŭgusto

6-a Esperanta Eŭrop-Unia Kongreso (EEU-Kongreso) kaj 63-a Hispana Esperanto-Kongreso en Bilbao (Vaskio-Hispanio). Inf: Grupo Esperantista de Bilbao, Barrencalle Barrena 7 - 1 D, ES-48005 Bilbao, Hispanio. Tel: +34-944-164492 (aŭtomata respondilo) Rete: esperantobilbao@terra.com

27 - 29. aŭgusto

Montopinto de Altaj Tatroj, Liptovký Hrádok, Slovakio. Inf: Surovček Vlado, tel: +421-(0)908-218680, +421-(0)44-5222402

29. aŭgusto - 4. septembro

SUS 27 de AIS San-Marino en Komárno (SK), Studadsesio de la Akademio Internacia de la Sciencoj. Inf: Reinhard Fössmeier, Rahel-Straus-Weg 19, DE-81673 München, Germanio

30. aŭgusto - 6. septembro

Sud-Nigramara Fotofiesto en Bulgario. Inf: Lasto Nikov, BG-1000 Sofio, P.K.497, Bulgario. Tel.:+359-2-9835084, +359-2-318840, posxtelefono: +359-887-303427. Rete: lasto@mail.bg aŭ lasto11@yahoo.co.uk

3 - 7. septembro

72-a Itala Kongreso de Esperanto - en Treviso. Inf: Itala E-Federacio, Flavia Del Zilio, via Capella 17/2, IT-31059Zero Branco (TV) Italio. Rete: kuniklo@tiscali.it

5 - 11. septembro

Internacia Arta Esperanto-Festivalo "Velura Sezono-2004" - en Jalta, Ukrainio. Inf: Loka organiza komitato, UA-98612 Jalta, a/k 74, Esperanto, Ukrainio. Tel. +38-0654-231651 Jefim Zajdman, rete: espero@yalta.crimea.ua

